

Gottfried Keller,
Pacon inter kreaĵoj

tradukita de Richard Schulz

Araneoj min naŭzadis,
Dum mi junulo estis,
De l' plafon' mallevigadis,
Sur la verto-haroj pestis,
Sidis aĉe enangule;
Aŭ kuregis tarantule,
Super manoj kaj vitrino.,
De l' mortig'ne estis fino.

Kiam la harar' griziĝis,
Tiam nur mi ilin lasis.
Pli trankvile mi fariĝis.
Ilin ne plu embarasis.
Kaj fratece ni nun vivas.
Mi ne plu ekofensivas.
Mi endome, ili rete,
Ĉiu agas nun diskrete.

Se mi havus infaneton,
Estus patro honorata,
Montrus mi la fajnan reton,
Al la zorge edukata,
Kaj instruus ĝin ekpreni
Araneojn per la mano,
Ree ilin ekmalteni.
Amus pacon la infano!

...

Gottfried Keller,
Pacon al la kreaĵo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Araneojn malŝatadis
Mi dum junecaj jaroj,
Ili malsupren sin lasadis,
Kuris sur la kap-haroj,
Sidis kaŝe en anguloj;
Min timigis la aĉuloj,
Sur la tablo kuregadis,
La mortigo ne ĉesadis.

Kiam la harar' griziĝis,
Mi ilin ne plu ĉasis,
Tiam fine mi saĝiĝis,
Ilin vivi lasis.
Nun mi ilin rare vidas,
Kaŝe ili ie sidas;
Sed se iu sin vidigas,
Mi min saĝe elvojjigas.

Se mi havus infaneton,
Mi gardus ĝin honore,
Gvidus ame la hometon,
Dirus al ĝi kore:
,Lasu vivi araneojn,
Ili same sentas veojn.'
Frue iĝus ĝi paculo,
Ne nur kiel maljunulo!

...

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, *1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1982-10-15.*

Arg-318-644 (2013-02-26 15:15:16)

Pri Rikardo Ŝulco kaj lia Analiza Skolo vidu ankaŭ: <http://www.ipernity.com/doc/37943/8965446> kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, *1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-10-10.*

MR-003-2 / Arg-318-643 (2005-08-02 15:49:32)